numero 70

oktobro 2000

# La Merkato

ISSN 0941-9306

## IKEF-membro Kees Ruig en Panamo kaj Kirgizio

De la 13a de septembro ĝis la 4a de oktobro 2000 Kees Ruig vizitas Panamon laŭ invito de la Ministerio pri Komerco kaj Industrio por instrui kaj konsili al ties oficistoj kaj al entreprenistoj pri internacia komerco.

Krome de la 16a de novembro ĝis la 23a de novembro 2000 li vizitos Kirgizion laŭ invito de la Ministerio pri Komerco kaj Industrio por helpi ĉe la fondiĝo de Ĉambro de Komerco.

Kiu havas konsilon aŭ peton rilate al tiuj vizitoj, kontaktu s-ron Ruig fakse (+31-24-3580320 - ne plu uzu la faks- aŭ retadreson de lia iama komerca ĉambro, ĉar li pensiiĝis!). Dum la foresto de Kees Ruig s-ro Braun kolektas la reagojn.

rr

## Enhavo

Ĝenerala Kunveno de IKEF dum UK . . . . . . . . . . 3-4
Vizito al ESHED . . . . . . . . . . 5
Kongresaj fotoj . . . . . . . . . . 6-7
Komuna staĝo IKEF-TAKE en Francio, aprilo 2001 . . . . . . . . . . 8
Terminologia staĝo en Ĉeĥio, 8-12 novembro 2000 . . . . . . . . . . 9
Sukcesa restado de Violette Walther en Ĉinio dank'al TAKE kaj IKEF . . . . . 10-11
Laborplano daŭrigata ĝis 2003 . . . . . . . . . . 12

**La Merkato** (LM) (ĝis numero 26: Laŭokaza Novaĵletero) estas organo de IKEF. Ĝi aperas kvaronjare (jan-apr-jul-okt) kaj servas al la membraro kiel komunikilo. Redaktoro: Roland Rotsaert. Limdato: mezo de la monato antaŭ apermonato.

La **Identecŝildaro** - iam dujara eldono - ne plu aperas. Anstataŭ ĝi, membroj povas aperigi siajn personajn informojn en La Merkato. Ĉiujare ili ricevas kompletan membroliston.

La **Estraro de IKEF**: S-ro Franz Josef Braun, Prezidanto kaj Ĝenerala Sekretario; S-ro Roland Rotsaert, Financa Konsilanto; S-ro François-Xavier Gilbert; S-ro Zoltan Könyves; D-ro Rainer Kurz; S-ro Seikô Yamasaki; S-ro Wang Tianyi

**Revizoro por la financa raporto**: D-ro Gianfranco Polerani.

**Centra sidejo**: Ĉe s-ro F.J. Braun, Hornisgrindestr. 8, D-77815 Bühl, Germanio.

**Financa sidejo kaj membrara administrado**:
Ĉe s-ro Roland Rotsaert, Visspaanstraat 97, B-8000 Brugge, Belgio,
telefono/fakso/respondilo: +32-50-330004; retpoŝto: rotsaert(a)esperanto.be.

IKEF-informoj en Interreto: www.ikef.org aŭ www.xs4all.be/~rotsaert/ikef/

La jara **membrokotizo** estas 15 eŭroj (EUR) por landoj laŭ UEA-kategorio "A" ("riĉaj landoj") kaj 10 EUR por landoj laŭ UEA-kategorio "B" ("malriĉaj landoj"). Egalvaloro en konverteblaj valutoj (ekz. usona dolaro - USD) kaj internaciaj respondkuponoj (IRK - kun stampilo de eldoninta poŝtoficejo) estas akceptataj. Kurzoj estas proksimume 1 EUR = 1 USD = 1,20 IRK. Dumviva membreco akireblas per unufoja pago egalvalora al 20-obla membrokotizo. Por pago per kreditkarto sendu instrukcion al Flandra Esperanto-Ligo.

**Kontoj**:
- ĉe UEA kaj FEL: kodo ikef-c
- belga poŝtĉekkonto (Bruselo): numero 000-1592629-83 (Swift: PCHQBEBB)

**Perantoj**

*Internacie*: Flandra Esperanto-Ligo (fakso 03-233.54.33, reto financoj(a)fel.esperanto.be, belga pĝk. 000-0265338-43)

*Ĉeĥio:* S-ro Vladislav HASALA, A. Dvořaka 1, CZ-696 62 STRAŽNICE; tel./fakso/reg.420-631-332507, retpoŝto vlada_hasala(a)iol.cz

*Ĉinio*: S-ro WANG Tianyi, Xi'an Jiangong-lu 3, CN-710043 Xi'an, telefono + fakso 0086-29-2232952, retpoŝto komerco(a)public.xa.sn.cn

*Francio*: S-ro François-Xavier GILBERT, 33, rue Louvière, F-55190 Void-Vacon (CCP 1275-89 L Nancy), tel. kaj fakso +33(0)3.29.89.82.15, retpoŝto efikso(a)aol.com

*Germanio*: S-ro Franz Josef BRAUN, Hornisgrindestr. 8, D-77815 Bühl (Volksbank Bühl, n-ro 713120, BLZ 66291400), tel. 07223/942064, fakso 942065, retpoŝto f.j.braun(a)t-online.de

*Hungario*: D-ro GETHER István, Palóc u. I, H-1135 Budapest XIII

*Italio:* D-ro Gianfranco POLERANI, Viale G. Suzzani, I-20162 Milano, retpoŝto g.polerani(a)agora.stm.it (poŝta konto 37485208)

*Japanio*: S-ro YAMASAKI Seikô, J-185-0014 Tôkyô, Kokubunzi, Higasi Koigakubo 3-18-12, retpoŝto syama(a)dokkyo.ac.jp (pĝk. n-ro 00160-3-253232, kotizo 2200 enoj)

**Raporto pri la Ĝenerala Kunveno 2000 de IKEF en Tel-Avivo (28 julio 2000, 14.15h)**

Prezidanto Franz Josef BRAUN kun ĉeesto de la estraranoj Roland ROTSAERT kaj YAMASAKI Seiko malfermis la kunvenon kaj salutis 20 ĉeestantojn, inter tiuj 15 membroj. Apartan saluton li dediĉis al d-ro Petro CHRDLE, UEA-estrarano por landa kaj faka agadoj kaj al la UEA-prezidintoj s-roj Grégoire MAERTENS kaj LEE Chong-Yeong, ĉiuj membroj de IKEF.

Jen la tagordo:

1. Raporto de la Prezidanto pri la agado de IKEF en 1999
2. Financa Raporto de la Financa Konsilanto por 1999
3. Decido pri la uzo de la profito de 729,46 EUR
4. Malŝarĝigo de la Estraro
5. Elektoj al la Estraro
6. Diskuto pri celoj, taskoj kaj farotaj agadoj de IKEF
7. Diversaĵoj

Raportoj - decido pri profito - malŝarĝigo

En sia raporto Prezidanto Braun atentigis al la skriba raporto aperinta en LA MERKATO n-ro 68 de aprilo 2000 sur la paĝoj 3 - 7. Reliefe li menciis la plej gravajn temojn el tiu skriba raporto. Li notis kreskantan membronombron (149 fine de 1999 kompare al 136 fine de 1998). Ja estis nove aliĝintaj 25 membroj en la jaro 1999, sed bedaŭrinde samtempe la estraro devis eksmembrigi 10 membrojn pro nepago de sia kotizo. La celo laŭ Laborplano 1998 - 2000, atingi 200 membrojn ĝis fine de 2000, jam ne ŝajnas esti realigebla.

Dum la verka agado estis en 1999 ne sur kontentiga nivelo (ekzemple en revuo MONATO, nia ĉefa podio por verkado, verkis 1999 nur 7 aŭtoroj kompare al 11 en la antaŭa jaro), grandan kontentigon faris la Terminara Sekcio. Laŭ la decido en Berlino 1999, la sekcio kun teamo de 7 kunlaborantoj sub kunordigo de s-ro Yamasaki realigis la eldonon de "INK-OTERMOJ 2000" (esperantigo de "Incoterms 2000", priskribo de la kondiĉoj por kontraktoj en la internacia komerco, eldonisto Internacia Komerca Ĉambro en Parizo) kaj prezentis la 128-paĝan broŝuron en la libroservo de la UK en Tel-Avivo.

El aliaj specialaj agadoj la prezidanto menciis la daŭrigon de la kunelaboro kun TAKE - 20 komunaj membroj de IKEF kaj TAKE profitas nun de la rabitata kotiztarifo -, kaj li anoncis la unuan komunan semajnfinan studseminarion je 20-22 aprilo 2001 en Storckensohn, orienta Francio. Plie Braun atentigis pri la utileco de esperantlingvaj reklamanoncoj en MONATO kaj de negocado de E-istaj komercistoj pere de la lingvo Esperanto kaj de aperigo de tiurilataj anoncetoj en LA MERKATO. Aparte ĝojiga fakto estas, ke IKEF denove posedas retpaĝaron kun adreso www.ikef.org, pro kio s-ro Rotsaert meritas laŭdon.



La Financa Konsilanto, s-ro Roland Rotsaert, prezentis kaj detale klarigis la ciferojn de la kontoj jam prezentitaj en LA MERKATO n-ro 68 de aprilo 2000, sur paĝoj 8 - 10. Li montris sin kontenta pri rezulto kaj neta gajno de 729,46 EUR, kio signifas rekordon en la 15-jara ekzistado de IKEF. La plusaj enspezoj venis de la 5 reklamanoncoj aperintaj 1999 en MONATO. Sed li avertis, ke nun staras antaŭ ni elspezoj precipe en la Termiara Sekcio por ties eldonoj.

Laŭ propono de la Estraro, la Ĝenerala Kunveno akceptis la aldonon de la jara profito de 729,46 EUR al la kapitalo.

Sub gvidado de nia revizoro d-ro Polerani, la Ĝenerala Kunveno aprobis la raporton pri la agado kaj la financan raporton kaj unuanime donis malŝarĝigon al la Estraro.

Elektoj

La dujara oficperiodo de la estraranoj s-ro Franz Josef BRAUN, d-ro Rainer KURZ kaj s-ro WANG Tianyi finiĝis en julio 2000. Ĉiuj tri denove kandidatiĝis. D-ro Polerani gvidis la procedon de elektado. Ne prezentiĝis aliaj kandidatoj. La tri ĝisnunaj estraranoj estis unuanime reelektitaj.

Diskuto kaj diversaĵoj

Enkonduke, prezidanto Braun montris la "Laborplanon 1998 - 2000" akceptitan dum la Ĝenerala Kunveno 1998 en Montpeliero. Tiu laborplano ja finiĝos je 31 decembro 2000, sed multaj el siaj agaderoj estas ne aŭ nur parte realigitaj. Post mallonga diskutado la Ĝenerala Kunveno decidis senmodife plivalidigi tiun laborplanon je tri jaroj, do ĝis fino de 2003.

Krome la ĉefa diskutado temis pri estonta terminara laboro. Unuafoje montriĝas nun la ŝanco kunlabore kun la tradukservaj instancoj de Eŭropa Unio ricevi terminojn pri ekonomi-o, komerco, financo el la 11-lingva datumbanko de EU por esperantigi ilin. Planita vizito ĉe tiu instanco en Luksemburgo en septembro [intertempe prokrastita ĝis decembro - rr] 2000 montros ĉu tiu agado estos realisma kaj realigebla. En aparta posta kunsido pri terminara laboro oni fiksis la procedon de la estonta agado.

Grava agado de IKEF dum ĉiu kongresa semajno de UK estas vizito al iu ekonomia instanco aŭ firmao. Tiel ankaŭ en Tel-Avivo. Prezidanto Braun anoncis la viziton al Firmao ESHED ROBOTEC en Rosh-Haajnin por lundo 31 julio kaj invitis al kunveturo en luita buso. fjb

**Raporto pri la vizito ĉe firmao ESHED ROBOTEC je 31 julio 2000, 10.00 h**

15 personoj - IKEF-membroj kaj interesitoj - veturis en buso luita de IKEF al firmao ESHED ROBOTEC (str. Hamelacha 13, industria parko Afek, Rosh-Haajnin, pr. 20 km de Tel-Avivo, www.eshed.com). Bedaŭrinde mankis pliaj kunveturantoj pro samtempe okazinta grava kunsido de la UEA-Komitato, en kiu troviĝas 10 membroj de IKEF, kiuj ne rajtis forlasi la kongreson. Nia israela membro Josef Shemer dankinde estis organizinta tiun viziton kaj s-ino Anat Zajdman akompanis nin tien kaj interpretis hebree - Esperanto.

Akceptis nin en Rosh-Haajnin s-ro Eldad Chereshnia, vic-ĝenerala direktoro. Post la prezentado de IKEF kaj ĝiaj celoj fare de prezidanto Franz Josef Braun, s-ro Chereshnia prezentis al ni sian firmaon. ESHED ROBOTEC estis fondita en 1982 kaj translokiĝis en 1995 al la nuna loko, tute nova industria parko Afek. Ĝi estas nun parto de ROBO Group. Krome apartenas al ROBO Group la firmaoj YAKAWA ESHED (Japanio, posedanta japanan scipovon pri industriaj robotoj) kaj Venture Capital Group (por akirado de kapitalo).

Komence ESHED ROBOTEC produktis industriajn robotojn. Sed baldaŭ la monda merkato por tiaj robotoj estis regataj de grandaj internaciaj entreprenoj, tial ESHED ROBOTEC devis specialiĝi kaj serĉi niĉon. Tiun niĉon oni trovis en nova speco de robotoj, per kiuj "la industrio lernas funkciigi robotojn". Hodiaŭ la firmao vendas ĉiujn robotojn uzatajn por instruado en industrio, universitatoj kaj lernejoj. Laŭ aserto de s-ro Chereshnia, ESHED ROBOTEC estas la plej grava produktisto de tiaj robotoj en la mondo kun aktuale 56 specoj da robotoj kaj jara vendosumo de 11 milionoj da USD. Preskaŭ la tuta produktado estas eksportata, al Eŭropo pr. 40 %, al orienta Azio pr. 30 % kaj al suda Ameriko pr. 30 %. En Usono troviĝas firmao INTELITEK, komunriska entrepreno kun 50 % de la kapitalo por ESHED ROBOTEC. INTELITEK liveras al la nordamerika merkato.

S-ro Chereshnia donis kelkajn klarigojn pri la ĝenerala situacio de la israela ekonomio, kiu estas karakterizita per
- malgranda lando kaj malgranda merkato,
- devigo al eksporto,
- manko de krudmaterialoj,
- kapablo por produkti altan teknologion,
- la plimulto de la laboristoj estas enmigrintoj el tre diversaj landoj,
- serĉo de niĉoj de sia produkta gamo por la monda merkato.

Firmao ESHED ROBOTEC kvazaŭ estas ekzemplo por tio. La perspektivo por la ekonomio en Israelo aktuale estas tre bona kun jara ekonomia kresko de 4 % kaj atendite ĝis 7 % estonte, inflacio "nur" 2-3 % (plej malalta iam ajn) kaj diligentaj laborfortoj enmigrintaj ĉefe el orienta Eŭropo. Tre interesa estis ankaŭ la atentigo, ke la armeo

konsumas 60 % de la ŝtata buĝeto. Ne mirige, se oni scias la politikajn problemojn en tiu regiono.

Post la detalaĵoj de s-ro Chereshnia, alia inĝeniero de la firmao demonstris al la vizitantoj la praktikan funkciadon de roboto.

Nome de la vizitantoj, s-ro Braun dankis al la sinjoroj pro la preteco de sia akcepto kaj pro la interesaj klarigoj. Kiel donacon Braun donis al s-ro Chereshnia ekzempleron de la ĵus aperinta IKEF-broŝuro "Inkotermoj 2000". S-ro Rotsaert bonege tradukintis la klarigojn el la angla Esperanten.

fjb

**Komuna Seminario Mulhouse Esperanto - TAKE - IKEF je 20-22 aprilo 2001**

La eŭropaj legantoj de La Merkato trovas en la koverto informilon/aliĝilon por la '49a Praktika Staĝo de Parolata Esperanto' kiu okazos je 20-22 aprilo 2001 en Storckensohn (nordorienta Francio). Ekstereŭropaj interesitoj povas peti la informilon je IKEF- aŭ TAKE-adreso.

**Komercaj petoj kaj proponoj**

Ĝenerala rimarko

Leganto atentigis nin ke nuntempe en komerca anonco nepre estu menciata iu moderna komunikilo: telefakso, retadreso, aŭ minimume telefonnumero. Mi konscias ke ekzemple por multaj afrikaj landoj tio simple ne eblas, sed tamen, sen tio apenaŭ eblas komenci negocon...

rr

Ĉinio

S-ro Chen Jinyin (Xigu Fuliqu Tuiguan-ban, Lanhua, 304-Chang, Lanzhou, Gansu, CN-730060) informas kaj komercas pri ĉinaj kuracmedikamentoj.

Tanzanio/Victoria-Lago

Mi serĉas eksterlandan kunlaboron por fiŝkaptado sur Victoria-lago kaj transporto de la fiŝoj eksterlanden. Mi havas sperton pri tio en (bankrotinta) kompanio. Mi nun laboras por 'LANESO' (Lake Nyanza Environmental Sanitation). Kafuya Musa Sindumbi, P.O. Box 7070, MABATINI-MWANZA, Tanzanio.

## Terminologio

Meze de novembro en Ĉeĥio okazos du renkontiĝoj por terminologoj kaj interesatoj pri E-terminologio, nome:

2000-11-08/10:

Terminologia seminario pri trafiko (de IFEF) en Dobrichovice apud Prago, kaj

2000-11-10/12:

Sekcio B "Terminologiaj problemoj de fakaj aplikoj de Esperanto", enkadre de la Kolokvo Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko (sub aŭspicioj de UEA).

Pli proksimaj informoj inkluzive provizoran programon de la tuta kolokvo kaj aliĝiloj troveblas ĉe: www.kava-pech.cz/kaest

Kvankam la programo jam estas finkompilita, se iu sentas havi vere valoran kontribuon, li demandu al la sekretario de la kolokvo Zdenek Pluhar <m.pluharova(a)worldonline.cz>, ĉu li ankoraŭ povos akcepti ĝin en la programon. Aliĝi sen preleg-kontribuo kiel aŭskultanto kaj/aŭ diskutanto eblas memkomprene sen limigo.

Se iu havas problemon legi www-paĝojn kaj interesatas pri la kolokvo, sufiĉas sciigi nin kaj ni sendos al ŝli la informojn en la formo de simpla retmesaĝo.

Ĉar mi nun estas preskaŭ seninterrompe survoje, eventualajn demandojn kaj aliĝilojn adresu prefere al la retadreso de Zdenek Pluhar (tamen kopie ankaŭ al la ĉefadreso de la kolokvo: kaest(a)kava-pech.cz).

Petro Chrdle (terminologio-listo)

## Novaj membroj

303. S-ro Josef MENDL, Pod stadionem 1136, CZ-399 01 MILEVSKO, Ĉeĥio,
tel +420368526328, rete <vmendl(a)volny.cz>

304. S-ro Jean HÉNIN, Route de Montcayroux, F-48500 LA CANOURGE, Francio



## Intervjuo

TAKE - LA DOMO intervjuis por LA DOMO kaj por LA MERKATO fraŭlinon Violette WALTHER, studentino pri internacia komerco, kiu dank'al niaj fakasocioj esperantistaj havigis al si staĝlokon en Ĉinio.

T:
En 1999 TAKE (LA DOMO) kaj IKEF (LA MERKATO) decidis reklami por staĝeblecoj en eksterlando por junaj esperantistoj. Vi profitis tiun eblecon. Rakontu al niaj legantoj, kiel tio eblis.

Violette WALTHER:
Pro la fakto, ke per la ordinaraj vojoj mi ne trovis staĝon en entrepreno, mi turnis min al la movado. Sinjoro R. ROTSAERT ĵus estis verkanta LA MERKATOn kaj li aperigis la retan version de la revuo kun alvoko pri staĝoj. Jam du tagojn poste revenis al mi per la reto proponoj el Serbio, Kroatio, Italio, Usono kaj Kanado kaj pluraj el Ĉinio! Kelkaj estis proponoj de entreprenoj, la aliaj estis proponoj de helpo por trovi entreprenon. Pro la ebleco partopreni la junularkongreson en HONGKONGO post mia staĝo, mi decidis akcepti la proponon de IKEF-membro s-ro YANG Zhaoyin en CHANGZHOU, kiu situas ne tro for de Shanghai, do en la sudo de Ĉinio. Mi ankaŭ menciu, ke malmultaj gekolegoj miaj trovis staĝon en eksterlando, tutmaniere nur en Germanio aŭ Britio.

T:
Ĉu vi staĝis en ŝtata aŭ en privata ĉina firmao ?

VW:
Unue dum du semajnoj en ŝtata firmao, poste en privata. La ŝtata firmao, CHANGZHOU GEAR WORKS, pagis al mi la hotelon por la tranoktado, sed mi restis tie nur du semajnojn, kio tamen estis interesa por sperti pri ŝtata entrepreno! Poste mi komencis duan staĝon en entrepreno kun usona kapitalo, SPIKE ELECTRONICS CO. LTD. Fakte temis pri firmao estrata de du ĉindevenaj usonanoj, kiuj investis en Ĉinio. Ĉiuj ceteraj deĵorantoj estis ĉinoj. La firmao loĝigis min ĉe sekretariino de la entrepreno, kiu iĝis vera amikino kaj kiun mi trejnis en la angla per konversaciado. Ŝi nun decidis lerni Esperanton!

T:
Ĉu vi havis interesajn taskojn en tiu entrepreno ?

VW:
O jes! Imagu! Krom la trejnado de deĵorantoj en la angla lingvo, oni komisiis min, enketi ĉe germana entrepreno, kun kiu la ĉina entrepreno iam estis komercinta, kaj nun tute ne plu reagis al kontaktoj. Post multnombraj telefonadoj mi eksciis de la germana firmao, ke ili ne vere komprenis, kion la ĉina firmao deziras, kaj kiel la ĉina firmao laboras. Tiam mi komencis kompreni du diversajn metodojn por solvado de problemoj. Ŝajnas al mi, ke la ĉinoj iras de ĝeneralaj principoj al la detaloj kaj ke la malo okazas ĉe la okcidentaj firmaoj.

Tiuj diversspecaj kulturoj de entreprenoj cetere iĝis la temo de mia staĝraporto.
La estraro eĉ komisiis min por organizi seminariojn pri mia studfako, t.e. internacia komercado, kaj tutspeciale komercado kun Eŭropo. Imagu! Dum pluraj gestudentoj de mia lernejo kvazaŭ nur pretigis fotokopiojn kaj... kafon por la gekolegoj en germanaj aŭ britaj entreprenoj!

T:
Kaj kio pri Esperanto?

VW:
Mi multege parolis Esperanton en Ĉinio! En CHANGZHOU mi kontaktis la prezidanton de la Esperanto-grupo, s-ron ZHANG Changsheng. Dum mia ĉeesto tie mi anstataŭis lin en instruado kaj instruis en elementa lernejo, en mezlernejo kaj en universitato. Por mi tio tute ne estis laboro, sed plezurego! Dum mia ĉeesto estis inaŭgurita nova lernejo, en kiu oni instruas Esperanton.
Kiam s-ro ZHANG Changsheng vizitis min en la firmao kaj kiam la deĵorantoj min vidis kaj aŭdis flue diskuti kun li, ili konsciis, ke Esperanto estas serioza lingvo kaj venis la interesaj demandoj!

T:
Ĉu vi partoprenis la vivon de la ĉinoj dum via restado?

VW:
Kompreneble! Jen estas ja la specifeco de la peresperanta vojaĝado! Kiel reĝino mi estis akceptita kaj ankaŭ ĉi-pere mi deziras danki pro tiuj neforgeseblaj monatoj. Sed pri tio mi eble pli detale rakontos en nefaka gazeto!

T:
Ni vin dankas pro viaj interesaj informoj.

VW:
Nur unu aferon mi ŝatus aldoni: temas pri alvoko al la legantoj de tiuj linioj. Jen: ĉina elementa lernjo, en kiu Esperanto estas instruata, bezonus ĉiaspecajn esperantaĵojn, ĉefe por infanoj. Se tiajn vi posedas, bonvolu sendi ilin al:

Elementa lernejo Henĝing / Primary school Henĝing
52 Hao, Jiankang Lu, Yancheng, Jiangsu, Ĉinio 224001.

aŭ ĉe la prezidanto de la Yancheng E-Asocio:
S-ro Yao Kaisheng, 23 Huancheng Beilu, Yancheng, Jiangsu, Ĉinio 224001



IKEF-LABORPLANO kadre de UEA-Kampanjo 2000 por internacia lingva ordo
Valideco plilongigita ĝis fino 2003 dum la ĝenerala kunveno de 28 julio 2000

| cif. UEA | speco de agado | responsulo | ↓ prioritato ↓ |
|---|---|---|---|
| 1.4.1 | Kampanjo "por pli vasta verdujo"<br>Pligrandigi la membraron de IKEF | | |
| | a) Difino de celgrupoj varbotaj<br>Ĉiuj homoj, kies profesio aŭ pangajna laboro rilatas al komerco, ekonomio kaj ekonomiko | estraro | 1 |
| | b) Difino de membronombro atinginda<br>200 membroj ĝis fino de 2000 | estraro | 1 |
| | - moto: Ĉiu membro varbu novan membron | ĉiuj m. | 1 |
| | - sendigi varbleteron tra UEA al ĉiuj UEA-membroj , kies profesio rilatas al nia fako | prez. FJB | 1 |
| | c) Krei argumentaron por "vendi" IKEF al siaj celgrupoj; establi laborgrupon por tio | prez. FJB | 2 |
| 1.4.2 | Celtrafaj IKEF-aj agadoj | | |
| | a) Okazigi vizitojn dum UK-semajnoj ĉe lokaj entreprenoj kaj/aŭ ekonomiaj institutoj | prez. FJB | 1 |
| | b) Okazigi similajn vizitojn dum aliaj Esperanto-aranĝoj, kondiĉe ke almenaŭ tri IKEF-membroj ĉeestas la aranĝon | koncerna-taj mem-broj | 2 |
| | c) Havigi reklamanoncon de entreprenoj al E-gazetoj | ĉiuj mem-broj | 1 |
| | d) Instigi kaj subteni negocon inter E-istaj komercistoj | ĉiuj mem-broj | 1 |
| | e) Terminara laboro | Yamasaki | 1 |
| | f) Verki fakajn artikolojn en E-gazetoj | membroj k. ĵurnalisma talento | 1 |
| 2.1.1 | Disvastigo de informoj pri E-o, UEA kaj IKEF | | |
| | a) Regule ĝisdatigi kaj ampleksigi la IKEF-ajn informpaĝojn en TTT | | 1 |
| | b) Plibonigo/plirapidigo de la komunikado inter membroj per uzo de retpoŝto | ĉiuj mem-broj | 1 |
| | c) Produkti nian IKEF-informilon E-lingvan ankaŭ en la plej gravaj naciaj lingvoj; krome tiaj tekstoj aperu in interreto | redaktoro RR | 2 |
| | d) Post ricevo de la plej bonaj informiloj nun ekzistantaj kaj tradukeblaj el naciaj lingvoj, kiujn la UEA-estraro elektos, ni kunhelpos al traduko kaj disvastigo (nur de tiuj kiuj iom rilatas al nia fako) | Yamasaki S. | 3 |

| | | | |
|---|---|---|---|
| 3.5 | Kontaktoj kun ekstermovadaj instancoj, kies aktivecoj rilatas al la celoj de IKEF<br>a) Komisiono de EU - Ekonomia Direkcio<br>b) Naciaj ministerioj pri ekonomio<br>c) Ekonomia fakultato de universitatoj kaj komercaj altlernejoj<br><br>d) Komercaj Ĉambroj | <br><br>M. Cwik<br>prez. FJB<br>sciencis-toj pri ekonomio<br>membroj kun kon-taktoj al K.Ĉ. | <br><br>2<br>3<br>2<br><br><br>2 |